1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Estu laŭdegata Allah, Sinjoro de l' Universo,

3. la Donema, la Pardonema,

4. Majstro de la tago de la Lasta Juĝo.

5. Nur Vin ni adoras kaj nur ĉe Vi ni serĉas helpon.

6. Gvidu nin sur la rektan vojon,

7. sur la vojon de tiuj, al kiuj Vi donis Vian gracon, kiuj ne meritis Vian koleron, kiuj ne eraris.

[illegible]

Patro nia, kiu estas en la ĉielo,
sanktigata estu Via nomo.
Venu Via regno.
Fariĝu Via volo,
kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero.
Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ
Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn,
kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.
Kaj ne konduku nin en tenton,
sed liberigu nin de la malbono.
Ĉar Via estas la regno
kaj la potenco
kaj la gloro eterne.

Ho dio, gvidu min, protektu min, lumigu la lampon de mia koro kaj faru min brila stelo. Vi estas la pova kaj la potenca.

---

**20** KAJ Dio diris ĉiujn sekvantajn vortojn :

2 Mi estas la Eternulo, via Dio, kiu elkondukis vin el la lando Egipta, el la domo de sklaveco.

3 Ne ekzistu ĉe vi aliaj dioj antaŭ Mi.

4 Ne faru al vi idolon, nek bildon de io, kio estas en la ĉielo supre aŭ sur la tero malsupre aŭ en la akvo sub la tero ; 5 ne kliniĝu antaŭ ili kaj ne servu ilin ; ĉar Mi, la Eternulo, via Dio, estas Dio severa, kiu la malbonagon de la patroj punas sur la idoj en la tria kaj kvara generacioj ĉe Miaj malamantoj, 6 kaj kiu faras favorkorajon por miloj al Miaj amantoj kaj al la plenumantoj de Miaj ordonoj.

7 Ne malbonuzu la nomon de la Eternulo, via Dio ; ĉar la Eternulo ne lasos senpuna tiun, kiu malbonuzas Lian nomon.

12 Respektu vian patron kaj vian patrinon, por ke longe daŭru via vivo sur la tero, kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi.

13 Ne mortigu.

14 Ne adultu.

15 Ne ŝtelu.

16 Ne parolu kontraŭ via proksimulo malveran ateston.

17 Ne deziru la domon de via proksimulo ; ne deziru la edzinon de via proksimulo, nek lian sklavon, nek lian sklavinon, nek lian bovon, nek lian azenon, nek ion, kio apartenas al via proksimulo.

DER ADORATIONSFRIEDE :
"IN ESPERANTO BETEN"

**AMBASSADE DU SOLEIL**

Rue de la Gare 23 J
2605 SONCEBOZ